FEBRUARO 2012

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN

# La Espero

2012:1

# Bonvenon al la sveda Esperanto-kongreso en Helsingborgo!

## Välkommen till svenska Esperanto-kongressen i Helsingborg!



ESPERANTO 125

1887-2012

## Esperanto 125 år

I år är det 125 år sedan ögonläkaren Ludwig Zamenhof i Warszawa gav ut *Lingvo Internacia,* den första läroboken i esperanto.

Det är ett bra tillfälle att informera mer om esperanto.

*S. 6*

## Kongress i Helsingborg

Årets internationella esperanto-kongress äger rum i Vietnam. Vid sidan av den finns hundratals mindre esperanto-kurser och lokala kongresser och festivaler som t.ex. Svenska Esperantokongressen i Helsingborg.

*S. 3-4*

## LA ESPERO

**Organ för Svenska Esperantoförbundet**
ISSN 0014–0694
Februaro 2012 • 100-a jarkolekto
Fondita en 1913

**Redaktion:** Leif Nordenstorm och Olof Pettersson
**Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:**
EsperantoCentro, Vikingagatan 24, 113 42
Stockholm, tel. 08–34 08 00. sveda@esperanto.se
**E-post:** laespero@esperanto.se
**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm
**Utformning:** Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm
**Tryck:** Pingvinpress
**Prenumeration 2012:** 200 kr.
Prenumerationsavgift för La Espero ingår i medlem savgiften.
Postgiro 20 12–3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

**Adress:** Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08–34 08 00
**E-post:** sveda@esperanto.se
**Nätsida:** www.esperanto.se
**Öppettider:** Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!
**Postgiro:** 20 12–3, Esperantoförbundet
**Medlemsavgift 2012:**
Direktansluten medlem 200 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero. Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).
**UEA-avgifter och prenumerationer:** Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel 0910-733810

## ESPERANTOFÖRLAGET

**Adress:** Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
**Postgiro:** 578–5 **Nätsida:** www.algonet.se/~eldona
**E-post:** eldona@telia.com Telefon: 070-5850054

## ESPERANTOGÅRDEN

**Adress:** Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,
**Nätsida:** www.e-g.se **E-post:** egarden@esperanto.se
**Telefon:** 0590-309 09

### Manus till La Espero

**sänds till** Leif Nordenstorm, Bellmansgatan 42, 2 tr, 754 26 UPPSALA, tel. 018-24 43 01
**e-post:** laespero@esperanto.se

| | *Stoppdatum* | *Utkommer senast* |
|---|---|---|
| Nr 1 | 15 januari | 15 februari |
| Nr 2 | 28 februari | 30 mars |
| Nr 3 | 30 april | 31 maj |
| Nr 4 | 15 augusti | 15 september |
| Nr 5-6 | 31 oktober | 30 november |

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

## NI PREZENTAS

# Kaisa Hansen



*Kie vi naskiĝis?*
En Stokholmo

*Kie vi loĝas?*
En Upplands Väsby

*Pri kio vi laboras?*
Mi nun estas pensiulo sed laboras plentepe pri esperanto.

*Kiujn interesojn vi havas krom Esperanto?*
Nian hundon Teddy (labradoro), pripersonan disvolvoĝon, florojn, vojaĝojn.

*Ĉu vi havas familion?*
Hejme: mian edzon, nian hundon kaj en la periferio: du gefilojn, kvin genepojn, ses gefratojn.

*De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?*
Eble de 1985.

*Ĉu vi havas aŭ havis iujn taskojn en la Esperanto-movado?*
Multajn: estrarano en Sveda Esperanto-Federacio, estrarano en Esperanto-Gastejo, estrarano en ILEI-se, estrarano en Eldona Societo Esperanto, respondeculo pri plibeligo de Esperanto-Centro, respondeculo pri la montrofenestro de Esperanto-Centro. Mi fondis Esperanton en Väsby, eldonis la gazeton "La Hirundo" dum sep jaroj, eldonis informfolion Språket Esperanto. Nun mi estas koordinanto pri informo al la esperanto-organizaĵoj en Svedio, teamulo pri gazetara informo por la 125-jubileo.

*Ĉu vi havas iun favoritan libron?*
La Profeton kaj Preter la horizonto de Khalil Gibran Khalil.

*Ĉu ekzistas aliaj interesaĵoj pri vi?*
Ne.

Intervjuis: **Leif Nordenstorm**

## VORTOJ DE LA REDAKTORO

Granda parto de mia esperantista vivo konsistis el redaktado de revuoj. Ekde 1978 ĝis proksimume 1984 mi redaktis ktp, kiu estis la revuo de Sveda Esperantista Julularа Unuiĝo. Inter 1983 kaj 1989 mi redaktis Kontakton, la revuo de Tutmonda Esperantista Jululara Organizo. Post tio mi komencis redakti La Esperon. Tion mi faris en 1989-1993 kaj ekde 2002 ĝis 2012.

Por mi la redaktado estis inspira kaj ĝojiga laboro. Multaj esperantistoj sendis kontribuojn. Mi ĉiam devis elekti inter la senditaj artikoloj.

Kompreneble la redaktado prenis de mi ankaŭ tempon. Pro tio mi nun lasas la redaktadon al nova redaktoro, kiu kune kun Olof Pettersson redaktos la revuon.

Mi tamen iom hezitas. Venontjare la revuo festos sian 100-jaran ekzistadon. Mi antaŭvidas la jubilean numeron.

Mi mem tamen daŭre estos aktiva en la Esperanto-movado, I.a. kiel prezidanto de Esperanto-Societo de Upsalo kaj de Eldona Societo Esperanto.

Do: Adiaŭ... kaj ĝis!

**Leif Nordenstorm**
Redaktoro de La Espero

# Anmäl dig till den svenska esperantokongressen!

*Kongresslokal: Folkets Hus, Södergatan 65, Helsingborg. Tid: (18-)19-20 maj 2012.*

Folkets Hus ligger vid Gustav Adolfs Torg på Söder i Helsingborg. Det är inom gångavstånd från Knutpunkten (Helsingborg Central). Flera av stadens busslinjer (1, 2, 3, 5, 7, 8) har hållplats "G A Torg", nästan mitt för ingången. Parkeringsplatser finns i närområdet.

Kongresslokalerna finns en trappa upp (hiss finns) och kommer att hållas öppna under fredagen mellan 9-12 och 13-18 för registrering. Lördag och söndag öppnar vi klockan 8.30.

## Utflykter

Under fredagen erbjuder vi två utflykter, en heldagsutflykt med buss till Kullaberg och Sofiero, och en kvällsutflykt – så kallad "tura" - med en av Scandlines färjor mellan Helsingborg och Helsingör, avgång cirka 19.00.



*Kullens fyr.*

Bussutflykten beräknas avgå från Folkets Hus klockan 9.30 med återkomst cirka 17.00. Den går genom det vackra nordvästskånska landskapet till naturreservatet Kullaberg där vi besöker spännande utställningar och Skandinaviens ljusstarkaste fyr samt tar en promenad i naturen. Vi äter lunch i den pittoreska hamnen Mölle och har tid att ströva i "syndens näste" innan vi åker vidare till Sofiero slott och trädgård med norra Europas största samling av rhododendron. Vi avslutar resan med att besöka esperantopionjären Gustav Henrik Backmans grav på Pålsjö kyrkogård i Helsingborg. Kostnad för bussutflykten inklusive lunch och eftermiddagskaffe är 450 kr.

## Program

Temat för lördagens föreläsningar är det nya gymnasieämnet "Människans språk", som införts inom det humanistiska programmet under höstterminen 2011. Folke Wedlin, som själv undervisar i ämnet, berättar om dess innehåll och om hur kunskaper i esperanto är ett stöd för läraren och en stor fördel i undervisningen. Hokan Lundberg och Olof Pettersson delger oss sina försök att skapa ett studiematerial, som kan erbjudas skolorna.

På söndagsmorgonen kommer KELI att tillsammans med GA Församling ordna en gudstjänst med inslag på esperanto i den stora GA-kyrkan på andra sidan Södergatan. Folkets Hus är öppet från 8.30, och klockan 11.15 serveras kaffe, följt av en föreläsning av Hokan Lundberg. Kongressen avslutas med lunch cirka klocka 13.00.

## Mat

Under kongressen serveras för- och eftermiddagskaffe samt lunch och kvällsmat på lördagen. På söndagen blir det förmiddagskaffe och lunch. Glöm inte att vid anmälningen ange om ni är gluten- eller laktosintolerant eller har någon allergi.

## Kostnader och anmälan


Kongresspaketet, med kongressavgift och mat enligt ovan, kostar för medlem i Svenska Esperantoförbundet 850 kr. Ungdomar som är under 20 år betalar 100 kr mindre i kongressavgift, och den som inte är medlem i SEF betalar 100 kr mer. Efter den 15 april tillkommer 100 kr. Kongressavgiften återbetalas inte vid eventuellt återbud.

Avgiften sätts in på plusgiro 59 18 80-0 Helsingborgs Esperantoförening. Skriv deltagarens namn och adress på talongen. *Skriv också telefon, eventuell e-postadress och eventuella önskemål om mat (t.ex. om du är vegetarian eller har allergier) på talongen* eller skicka uppgifterna som e-post till sefkongr2012@esperanto.se. Anmälan är giltig när kongressavgiften är inbetald. **Skicka in anmälan före de 15 april.**

Tänk på att i god tid boka rum på hotell eller vandrarhem. De preliminära reservationer vi gjort på Comfort Hotel Nouveau och Stadsmotellet upphör 18 april respektive 30 april. Eventuell avbokning av boende måste du göra själv.

## Kongresskommitté

Kongresskommittén (LKK) består av medlemmar i Helsingborgs Esperantoförening. Frågor och anmälningar sänds till sefkongr2012@esperanto.se eller ring Ann-Louise Åkerlund 0736-170123 eller Dan Palm 0701-709460.



*Sofiero slott.*

# Partoprenu la svedan kongreson de Esperanto!

Loko: La Popola Domo, Södergatan 65, Helsingborg
Tempo: (18-)19-20 majo 2012

## Programo

Dum vendredo okazos tuttaga ekskurso per aŭtobuso al la konata terlango Kullaberg kaj la eksa reĝa ĝardeno Sofiero. Vespere: Kunmanĝado sur ŝipo inter Svedio kaj Danio. Sabate estos prelegoj pri la nova lernobjekto en la svedaj gimnazioj: "La Homa Lingvo", diversaj jarkunvenoj kaj vespera programo kun muziko. Dimanĉe estos prelegoj interalie pri la prilaborata retejo 'esperanto-info.org' kaj sveda-esperanta diservo en la apuda preĝejo.

### Svenska Esperantokongressen
18-20 maj 2012, preliminärt program

Fredag 18/5
Utflykt med buss. Avfärd 9.30 från Folkets Hus, återkomst ca 17.00. Se separat program.
Kvällsutflykt med Danmarksfärjan, ca 19.00.
A-salen öppen 9-12 och 13-18 för registrering och avhämtning av kongressmaterial.
ILEI-konferens i D-salen 13-17.

Lördag 19/5
9.00 – 10.00 Årsmöte Esperantoförlaget.
10.00 – 10.15 Invigning med kort anförande av kommunstyrelsens vice ordförande Mikael Skoog.
10.15 – 10.45 Kaffe
10.45 – 12.15 Föreläsning. "Modela lingvo – informado pri Esperanto enkadre de la nova lernobjekto 'Homa lingvo' ", Folke Wedlin.
12.30 – 13.30 Lunch
13.30 – 15.00 Årsmöte SEF.
15.00 – 15.15 Kaffe
15.15 – 16.30 Föreläsning. Hokan Lundberg och Olof Pettersson om studiematerial till "Människans språk".
16.30 – 17.30 Årsmöte ILEI.se.
17.30 – 18.00 Rondo Langlet. Mottagning för inbjudna. För övriga: Bildspel och/eller tävling.
18.00 – 19.30 Kvällsmat.
19.30 - Underhållning. La Perdita Generacio, La Mondsteluloj, Carlos.

Söndag 20/5
9.00 – 9.30 Årsmöte KELI.
10.00 – 11.00 Gudstjänst i GA-kyrkan.
11.15 – 11.30 Kaffe
11.30 – 12.30 Föreläsning. "Spertoj de trilingva familio", Hokan Lundberg.
12.30 – 13.00 Avslutning.
13.00 - Lunch.

## Kostoj kaj aliĝo

La kongreskotizo estos SEK 850 por membroj de SEF, por nemembroj SEK 100 pli, por gejunuloj ĝis 20 jarojn aĝaj SEK 100 malpli. Ĝi inkluzivas la tutan programon dum sabato kaj dimanĉo, antaŭ- kaj posttagmezan kafon, tagmanĝon kaj vespermanĝon dum sabato, kaj antaŭtagmezan kafon kaj tagmanĝon dum dimanĉo, sed *ne* la ekskursojn.

La kosto de la busekskurso estos SEK 450 kun ĉiĉeronado, tagmanĝo kaj posttagmeza kafo. Dum la vespera eksurso vi mem pagos kion vi volas manĝi kaj trinki en la restoracio surŝipe.

Aliĝu aŭ/kaj petu pliajn informojn ĉe sefkongr@esperanto.se aŭ telefone ĉe Ann-Louise Åkerlund 0736-170123 aŭ Dan Palm 0701-709460. Paperpoŝta adreso: Ann-Louise Åkerlund, Ättekullagatan 16, SE-253 61 Helsingborg, Svedio.

Pagu al la sveda pg-konto 59 18 80-0 (Helsingborgs Esperantoförening) aŭ surloke, post interkonsento ĉe aliĝo, en svedaj kronoj. Ĉe aliĝo, ne forgesu skribi vian nomon kaj adreson, ĉu vi volas partopreni ekskurson (kiun?) ĉu vi volas pagi surloke kaj ĉu vi estas vegetarano aŭ havas alergion.

Bonvenon!

# Loĝeblecoj

La kongresejo situas en Södergatan 65, en la suda parto de la urbo. Inter la stacio Knutpunkten (Helsingborgs Central) kaj la kongresejo troviĝas kelkaj hoteloj kaj gastejoj. Ni rezervis kelkajn ĉambrojn en la du subaj hoteloj. **Bonvolu ne disvastigu la kodojn por mendo, ili estas nur por tiuj, kiuj aliĝas al la kongreso.** Kompreneble vi povos trovi ankaŭ aliajn hotelojn en la urbo. La deĵorantoj bedaŭrinde ne parolas esperanton.

**Stadsmotellet** situas en Hantverkaregatan 11, malantaŭ la kongresejo Folkets Hus. Ĝi havas unu- ĝis 3-litajn ĉambrojn. Ĉiu ĉambro havas propran banĉambron kaj televidilon. Unulita ĉambro kostas 695:- kaj dulita 845:-. Por du-litaj ĉambroj eblos ricevi rabaton se vi mendos ĝin por pli ol unu nokto. La prezo inkluzivas parkejon kaj bufedan matenmanĝon. Ni rezervis kelkajn ĉambrojn ĝis la 30a de Aprilo.
www.stadsmotellet.se
stadsmotellet@telia.com
042-12 79 55

**Comfort Hotel Nouveau,** Gasverksgatan 11, ofertas unulitajn ĉambrojn por 695:- kaj dulitajn por 895:- inkluzive matenmanĝon. Ĝi situas en 7-minuta perpieda distanco de la stacio. Kelkaj ĉambroj estas rezervitaj ĝis la 18-a de aprilo. ---

# Konferenco de ILEI-se 18.5 2012 je 13-17 h

* Kiel motivigi al lernado de Esperanto en Svedio – taskoj kaj celoj de ILEI-se
* Kafo
* La Esperanto-Insulo de Hajnano.
* Peter Wraae, Kopenhago, kun bildoj raportas pri sia partopreno en la intensa esperantokurso.

## ANONCETOJ

**FILM FRÅN TOGO**
Beställ DVDn med 3 filmer om mina iaktagelser i Togo 2011. Dessa är ca 30 minuter långa. De handlar om Instituto Zamenhof i Lomé, och visar en Esperanto-lektion på Esperanto, Togolanda Esperanto Kongreso, utflykten till en by på landet där min fadder-familj bor, vidare det dagliga livet och en utflykt till en nationalpark i norra Togo. Filmerna har afrikansk eller esperanto musik. DVD:n kostar 60 kr, som du kan skicka till Handelsbanken (clearing 6531) konto 103 977 252 (Willem Posthuma). Skriv ditt namn och skicka mig din adress (w.posthuma@esperanto.se) så kommer DVDn med post.
Du stödjer därmed institutet med 40 kr.

**DEZIRAS KORESPONDI**

Dismas Robert, P.O. Box 354, Bunda, Mara, Tanzanio, retadreso: dismasrobert72@gmail.com.
Mezaĝa edzo el urbeto ĉe la Viktoria lago serĉas korespondamikinojn/-amikojn. Li interesiĝas pri komerco, vojaĝo, prahistorio kaj aliaj temoj. Li skribas: Al mi la korespondado instigas la lernadon de la lingvo.

## TRA LA LANDO

# Nova semestro en Gotenburgo

La klubo en Gotenburgo finis la aŭtunan semestron per kunveno kun kvizoj kaj kristnaskaj donacoj. La unua vintra/printempa kunveno okazos la 1-an de Februaro kun praktikado de tufado.

# Bunta program' en Stokholmo

Esperanto-Klubo de Stokholmo planis sian programon la unuaj du monatoj de la jaro:

11 januaro: Pri la nordsamea lingvo, 25 januaro: Jarkunveno; 8 februaro: Vojaĝo al Tajlando; 15 februaro: Fotoj de Stokholmaj esperantistoj; 22 februaro: La nova estrarano Tatu Lehtilä prezentas sin; 29 februaro; Kantvespero.

# Kurso okazos en Upsalo

Esperanto-Societo de Upsalo ne sukcesis organizi vesperan kurson, kaj anstataŭ tio organizos semajnfinan kurson. Tamen la afero progresas!

# Gratis ordbok

En gratis ordbok finns nu på internet med bl.a. Esperanto. Här finns både uttal och förslag till fraser: gratis-ordbok.se

# Kolormondo

Kolormondo är ett nytt och unikt sätt att förstå färgläran. Genom att presentera färger i en tredimensionell glob blir deras inbördes relationer tydliga.

Kolormondo mottog Stockholms Stads uppfinnarpris 2011. Hemsidan www.kolormondo.com och namnet på färgläran är på esperanto.

# Esperanto i ny gymnasiekurs


Från och med höstterminen 2011 gäller en ny läroplan för gymnasieskolan, Gy11. Enligt Skolverkets kursplan för ämnet "Människans språk" som ingår i det humanistiska programmet, ska undervisningen i kursen bland annat behandla olika typer av språk och kommunikation, till exempel kroppsspråk, teckenspråk och konstgjorda språk, liksom språkets roll i interkulturell kommunikation. Med andra ord finns gott om möjligheter att anknyta till och använda esperanto som exempel. I den i dagsläget enda läroboken i ämnet, "Språket och människan" av Östen Dahl, ägnas ungefär en halv sida åt esperanto och dess tillkomst i kapitlet "Några speciella språk".

På Cybergymnasiet i Stockholm har Håkan Lundberg och jag hållit några gästlektioner om esperanto och om konstruerade språk i allmänhet för de ungefär tjugo eleverna i klassen på humanistiska programmet där. Bland annat har de fått se några avsnitt från DVD:n "Esperanto är..." och lära sig lite allmänt om esperantos tillkomst och struktur, och under ett annat lektionspass fått lära sig grunderna i språket och göra övningar på kurssajten lernu.net.

**Olof Pettersson**



*Håkan Lundberg håller lektion om esperanto för elever på humanistiska programmet på Cybergymnasiet i Stockholm. Foto: Olof Pettersson*



DEZIRAS KORESPONDI

W. Malanee (18 jaroj). Membro de Junulara Esperanto Klubo de Shanthi (JEKS-Mem. Nu. 326), Sri-Lanko. Universitata Studanto. Rete. info.shanthee2011 @gmail.com

Premalatha R. (21 jaroj) Membro de Junulara Esperanto Klubo de Shanthi (JEKS-Mem, Nu 289), Sri-Lanko. Instruistino. Rete. info.shanthee2011 @gmail.com

Shanika Maduwanthee (17 jaroj). Membro de Junulara Esperanto Klubo de Shanthi (JEKS/Mem.NU/372), Sri-Lanko. Studanto. Rete. info.shanthee2011 @gmail.com

G. M. Ranjika Subashani (13 jaroj). Membro de Junulara Esperanto Klubo de Shanthi (JEKS), Sri Lanko. Patro estis jurnalisto kaj li forpasis en 2009. Nun vivas kun patrino, fratino kaj avino. Lernas en 6a klaso ĉe Diyatalawa M. V. Ankaŭ membro de la "St. John Ambulance Association of Sri Lanka". Rete. info.shanthee2011 @gmail.com

Shehan Maduwantha (14 jaroj). Membro de Junulara Esperanto Klubo de Shanthi (JEKS), Sri Lanko (JEKS/373) Studanto de 7a klaso. Rete. info.shanthee2011 @gmail.com

## Letero de Sri-Lanko

Ni ricevis tiun ĉi leteron de Sri-Lanko:

Kara Gesamidajanoj !
Mi estas prezidanto de Junular Esperanto Klubo de Shanthi, Diyatalawa, Sri lanko.
Junulara Esperantisto Klubo de Shanthee (JEKS) estas la loka klubo por esperantistoj en la Diyatalawa regiono. Ĝi fondiĝis en 2009. Celo de nia klubo estas efektivigas diversoj projektoj al la esperantistaj junularoj de la areo, al plibonigi ilia kono, pozoj, kompetentoj kaj lertoj. Societo por la Vivstilo Liberi el Narkoto kaj Alkoholo estas la pli nova projekto kiu ni efektivigis. Ni estas ĝis nun nur malgrandeta grupo, sed tre aktiva klubo. Tie estas 288 aktivaj membroj en nia klubo. Kaj ni havis ankaŭ kvar Esperanto-parolaj familioj.
Mi sendas vin adresoj de kelkaj membroj de nia klubo kiu deziras al korespondu membroj de via klubo. Ilia celo estas plibonigi ilia lertoj pri Esperanton. Mi petas vin plaĉi publikigi ĝin en via bultenon.
Dankas vin.
Amike,
Rupa Gunatilaka.

La korespondpetojn vi povas vide tie ĉi je la maldekstra flanko.

## IJK dufoje en Azio

Post trisemajna necerteco pri loko de 68-a Internacia Junulara Kongreso, kaŭzita de subita rezigno de Japana Esperanto-Junularo, TEJO-Estraro alprenis la decidon pri okazigo de IJK 2012 en Hanojo, Vjetnamio - samurbe kiel la Universala Kongreso. Decidita estas ankaŭ loko de TEJO-kongreso en 2013 - ĝi okazos en Israelo.

## PIV en la reto

Okazis kampanjo por kolekti monon necesan por aperigi Plenan Ilustritan Vortaron en Interreto. Bezonataj estis 10000 eŭroj. Pro kelkaj grandaj donacoj la sumo nun estas atingita kaj la publikigo komenciĝos. La mono estis bezonata i.a. por aĉeti la rajton publikigi la vortaron de Sennacieca Asocio Tutmonda, kiu posedas la rajton. Legu plu en vortaro.net

## Esperanto 125-jara

Fakte antaŭ 125 jaroj Zamenhof presigis kaj dissendis la *Unuan Libron* de Esperanto kun la famaj slipetoj: Mi promesas lerni, se 10 milionoj promesos. El tiu ago sekvis grandaj rezultoj.

Kion ni povas fari nun por inde festi tiun datrevenon? Laborgrupo de UEA proponas du agadliniojn:

* ĉiu landa asocio provizu sin per reta kurso pri Esperanto en sia lingvo, kio estu integra parto de la laboro por Esperanto en tiu lando, kun landaj studgvidantoj, kiuj gvidu la lernantojn al la ekzistanta komunumo. Estas vero, ke en multaj landoj ankoraŭ funkcias relative bone ankaŭ ĉeestaj kursoj, sed ankaŭ tie oni lanĉu siajn retajn kursojn.
* ĉiu landa asocio (aŭ loka grupo aŭ alia grupiĝo) provizu sin pri respondeculo pri informado. rimarkata de multaj, kaj espereble ankaŭ de Google.
* Do, fina alvoko: pruvu al vi mem, ke vi kapablas imiti Zamenhof-on! Kontaktu la laborgrupon kaj prezentu vin kaj la ideojn, kiujn vi volas mem realigi dum ĉi tiu jubilea jaro. Skribu al jubileo-125@yahoo groups.com kaj vi trafos samtempe ĉiujn ĝiajn membrojn.

Nur per kunlaboro de ĉiuj ni povas esperi realigi la duonon de tio, kion realigis Zamenhof sola kaj sen komputilo.

**Laŭ gazeta komuniko de UEA**

## 26 landoj en Hajnano

Al Esperanto-kursaro en Hajnano suda Ĉinio aliĝis plentempaj kursanoj 120, parttempaj kursanoj 8, entute, 128, el 26 landoj. Dum unu monato okazas kursoj pri Esperanto kaj universitatnivelaj kurson en Esperanto pri aliaj fakoj.

## Tagoj por agado




Nun, post la novjaraj rendevuoj – aparte multaj en Europo – ni komencas novan laborperiodon. Ekzistas datoj aparte taugaj por la informa interna kaj ekstera aktivado. Temis pri:

* Tago de la Gepatra Lingvo (21 februaro),
* Semajno de Internacia Amikeco (la lasta plena de februaro),
* Mortodatreveno de d-ro Zamenhof (14 aprilo),
* Gazetara Kampanjo ĉ. UK (inter majo kaj oktobro), ·
* Datreveno de la apero de la Unua Libro (26 julio),
* Internacia Tago de Paco (21 septembro),
* Eŭropa Tago de Lingvoj (26 septembro),
* Ago-Tago (oktobro),
* Zamenhof-tago, i.a. kiel la Tago de Eesperanto -libro (15 decembro).

Nunjare lau la decido de la Komitato UEA aparte instigas landajn asociojn aktive organizi kaj partopreni ĉiujn ĉi tagojn kaj aldone akcenti la 100-an naskiĝdatrevenon de Tibor Sekelj (14.02), vojaĝanto, ĵurnalisto kaj verkisto.

La renkontiĝeto GEO. Ĝi okazos en Hungario por ekskursemaj kaj ludemaj esperantistoj. Ni aparte bonvenigas familiojn kun infanoj. La renkontiĝeto okazos inter la 11a kaj 15a de Julio, 2012. Jen la hejmpaĝo de renkontiĝeto: http://geoesperanto.xoo.hu/

# KER-examen i Lesjöfors och övriga världen

UEA, vårt internationella förbund, har valt att satsa på det gemensamma europeiska språkkunskapsstystemet, som på esperanto förkortas KER. Hela 27 europeiska språk samverkar om ett och samma system som gör att kurser, språkkunskaper och examina kan jämföras. Man kan själv också värdera sin egen nivå inom olika språk.

Ett av de 27 språken är esperanto. En ungersk högskola för främmande språk granskar alla skriftliga delar av KER-examen i esperanto. För Sveriges del och svenska språket är det Stockhoms universitet som deltar i den internationella KER-samordningen.

## Samtidig examen

Den 9:e juni i år arrangeras samtidigt KER-examen i esperanto världen runt. Det är 125 år sedan Zamenhof publicerade Första boken. Kanske ett sätt för esperantister att för alltid minnas jubelåret, att just då få sitt dagtecknade diplom.

KER-examen består av två delar, en muntlig och en skriftlig. Den 9:e juni kan man bara göra den skriftliga delen, det finns helt enkelt inte tillräckligt många godkända examinatörer för att samtidigt göra också den muntliga delen i alla aktuella länder. Den får man göra senare vid någon kongress eller liknande.

Över 500 esperantister har redan tagit KER-examen. Den magiska siffran passerades under UK, världskongressen, i Köpenhamn i somras.

Esperantoexamen enligt KER kan avläggas på tre nivåer, lägre, mellan- och högre. De kallas på fackspråk B1, B2 respektive C1. På dessa nivåer koncentrerar sig UEA. I den internationella standarden finns dessutom för nybörjare A1 och A2 samt allra högst C2. För A-nivåerna 1 och 2 räknar man med att riksorganisationerna ska svara, när materialet så småningom föreligger.

## Välkommen till Lesjöfors

En av orterna "världen runt" är Lesjöfors, som för Sveriges och Nordens del arrangerar examen. Till Esperanto-Gården kommer då Roland Lindblom och Ulla Luin för att under Katlin Kovats ledning övervaka det hela.



Kostnaden är hälften av den fastsställda examensavgiften, eftersom bara den skriftliga delen görs, och kommer att meddelas senare eftersom eurokursen varierar. Den varierar också något mellan nivåerna, men det handlar om storleksordningen 300 till 400 kronor. Klarar man examen erhåller man ett elegant diplom från Ungern på fyra språk, varav självfallet ett är esperanto. Esperantogården erbjuder logi till vandrarhemspris och mat till självkostnadspris.

För ytterligare information och anmälan, se www.edukado.net/ekzamenoj, eller skicka e-post till sef-ker2012@esperanto.se. Den som saknar möjlighet till e-post kan skriva till Esperanto-Gården, Examen, 68096 Lesjöfors, eller ringa Bengt Nordlöf, 070-7782430.

LINGVO

# Predikativo en akuzativo

Demando: Mi ne certas pri la reguloj pri akuzativo. Ĉu la sekvontaj frazoj estas seneraraj? (Se ne, bonvolu plibonigi kaj klarigi la regulon.)

1. Mi farbis la blankan muron blua.
2. Mi trovas ŝin alloga.
3. Oni elektis lin prezidanto.
4. Li distingis sin kiel plumpan mokanton.
5. Mi havas pli ol 21 jaroj.

Respondo: Kara samideano, La unuaj tri frazoj estas tute nepriproĉeblaj. La kvara frazo ne havas gramatikajn erarojn, sed ĝi estas konfuza kaj malklara. Kion povus signifi "plumpa mokanto"?

Estas por ni malfacile imagi kuntekston, en kiu tiu ĉi frazo akirus klaran sencon. La kvina frazo estas gramatike erara. Evidente via intenco estis diri "Mi havas pli ol 21 jarojn".

Komparu tion ĉi kun zamenhofaj ekzemploj: ili ĉiuj kune okupus ne pli ol unu malgrandan folieton * prezentas ne pli ol iajn 10% * Mi havas ne pli ol kvindek spesmilojn * kaj ekbruligis pli ol dekses kandelojn * oni bezonis por tio pli ol tutan tagon kaj tutan nokton * ŝi amas lin pli ol ĉiujn belegaĵojn de Weimar * pli ol dek fojojn mi aŭdis, kiel li laŭte ilin legis al si.

Plej simple eblas klarigi, kial oni diras tiel, jene: "ne", "jam", "ankoraŭ", "ankaŭ", "(mal)pli ol" aŭ "ne (mal)pli ol" k.s. ne ŝanĝas la gramatikan rolon de la sintagmo al kiu ili rilatas.

Jen alia maniero esprimi la saman sencon: Mia aĝo estas pli ol 21 jaroj.

Ankaŭ tia ĉi modelo estas trovebla en la verkoj de Zamenhof: la aĝo de ambaŭ knabinoj povis esti ne pli ol kvar jaroj * kiu certe havis la aĝon de ne pli ol ses jaroj


Memkompreneble, oni povas trovi modelojn de imitinda stilo ankaŭ en verkoj de multaj aliaj "bonaj aŭtoroj".

**Alexander Shlafer**

El la retejo akademio-de-esperanto.org kie estas ankaŭ aliaj interesaj lingvaj artikoloj.

## Surrealisma fotorakonto

*Eble lunlumas. Julien Nicolas. Fotolibroj, albumoj. Julien Nicolas. Chabottes. 2010. 42 paĝoj. Prezo: 18.00 eŭroj ĉe UEA.*




Malofte aperas en Esperanto artaj libroj. Jen escepto. "Eble Lunlumas" konsistas el nigra-blankaj fotoj, arte faritaj. Per ili la aŭtoro rakontas pri serio da eventoj en la vivo de la heroo. La mallongaj tekstoj - kiuj fine de la libro ripetiĝas en la Franca kaj Angla - priskribas okazaĵojn vere strangajn. La leganto - almenaŭ mi - devas relegi la libron plurfoje por kompreni pri kio temas.

Eble mi eĉ ne fine komprenis, sed faris mian propran interpreton pri la okazaĵoj. La reta katalogo de UEA uzas la esprimon "surrealisma" kiam ĝi priskribas la libron. Tio estas bona priskribo. Do, se plaĉas al vi surrealismaj rakontoj, nigra-blankaj artaj fotoj aŭ simple novaj legaj travivaĵoj la libro estas io por vi.

**Leif Nordenstorm**

## 1950-jareska hororfilmo

*Attack of the Moon Zombies. (Atako de la lunaj zombioj). Saint Euphoria Pictures. 2011. 9.00 eŭroj ĉe UEA.*




Jen hororilmo produktita ke ĝi aspektas kiel ĝi estis farita en la 1950-aj jaroj. Alvenas spacoŝipo al la luno por pace esplori tiun lokon. Baldaŭ oni tamen ekrimarkas ke ne ĉio sur la luno estas en ordo. Sen malkovri ĉion ni tamen povas rakonti tion, kion jam la titolo de la filmo malkaŝas: sur la luno ekzistas zombioj, kiuj komencas ataki la homojn. La ceteron ni ne rakontos tie ĉi. Vi devos spekti la filmon.

La filmo estas produktita en angla lingvo. Sur la DVD oni tamen trovas du lingvajn versiojn: la originalan anglan kaj version dublitan en Esperanto.

Gejunuloj, kiuj naskiĝis post 1990 verŝajne ne memoras ke la filmoj antaŭ tiu jaro estis malpli rapidaj ol la nunaj. Tamen tiel estis. Tial mi kun aparta ĝojo spektas tiun ĉi filmon. Ĝi estas kiel historia atesto pri la maniero produkti filmojn antaŭ 50 aŭ 60 jaroj.

Do, aĉetu ĝin kaj ĝuu ĝin en kluba kunveno aŭ hejme.

**Leif Nordenstorm**

### Kallelse till årsmöte för Svenska Esperantoförbundet

Svenska Esperantoförbundets årsmöte kommer att hållas lördagen den 19 maj kl 13.30 i samband med SEF:s års-kongress på Folkets hus i Helsingborg. Motioner till årsmötet ska ha inkommit till förbundsstyrelsen senast 2 månader innan årsmötet.

I enlighet med nuvarande stadgar ska ombud till årsmötet inkomma med fullmakter till förbundets sekreterare (Ann-Louise Åkerlund) senast 1 vecka innan årsmötet.

Årsmöteshandlingar kommer att skickas till klubbarna ca 1 månad innan årsmötet och de medlemmar som önskar en digital version kan meddela detta till sekreteraren.

Styrelsen

### Kallelse till årsmöte för Förlagsföreningen Esperanto

Lördagen 19 maj 2011 kl. 9.00 på Folkets Hus i Helsingborg

Styrelsen

# Informoj pri loĝeblecoj dum la sveda kongreso 2012.

La kongresejo situas en Södergatan 65, en la suda parto de la urbo. Inter la stacio Knutpunkten (Helsingborgs Central) kaj la kongresejo troviĝas kelkaj hoteloj kaj gastejoj. Ni rezervis kelkajn ĉambrojn en la du subaj hoteloj. **Bonvolu ne disvastigu la kodojn por mendo, ili estas nur por tiuj, kiuj aliĝas al la kongreso.** Kompreneble vi povos trovi ankaŭ aliajn hotelojn en la urbo. La deĵorantoj bedaŭrinde ne parolas esperanton.

**Stadsmotellet** situas en Hantverkaregatan 11, malantaŭ la kongresejo Folkets Hus. Ĝi havas unu- ĝis 3-litajn ĉambrojn. Ĉiu ĉambro havas propran banĉambron kaj televidilon. Unu-lita ĉambro kostas 695:- kaj du-lita 845:-. Por du-litaj ĉambroj eblos ricevi rabaton se vi mendos ĝin por pli ol unu nokto. La prezo inkluzivas parkejon kaj bufedan matenmanĝon. Ni rezervis kelkajn ĉambrojn ĝis 30/4.
www.stadsmotellet.se stadsmotellet@telia.com 042-12 79 55

**Comfort Hotel Nouveau,** Gasverksgatan 11, ofertas unu-litajn ĉambrojn por 695:- kaj du-litajn por 895:- inkluzive matenmanĝon. Ĝi situas en 7-minuta perpieda distanco de la stacio. Kelkaj ĉambroj estas rezervitaj ĝis la 18-a de aprilo.
www.hotelnouveau.se co.nouveau@choice.se 042-37 19 50

Por havi la kodojn por la mendoj, kontaktu nin retpoŝte ĉe sefkongr@esperanto.se aŭ telefone ĉe Ann-Louise Åkerlund 0736-17 01 23 aŭ Dan Palm 0701-70 94 60.

Troviĝas du gastejoj (vandrarhem) inter la stacio kaj la kongresejo. Ne eblis por ni antaŭmendi ĉambrojn tie. Vi devas kunporti proprajn litotukojn, aŭ lui surloke.

**Helsingborgs Vandrarhem Centrum** situas en Hantverkaregatan 2, iom norde de la kongresejo. Ĝi havas 14 ĉambrojn kun 1 ĝis 4 litoj kaj senpaga WiFi. Necesejo kaj duŝejo troviĝas en la koridoro. La ĉambroj kostas ekde 295:- por unu-lita ĉambro ĝis 995:- por 4-lita ĉambro. La prezo inkluzivas simplan matenmanĝon. Kafo kaj teo haveblas senpage.
www.helsingborgsvandrarhem.com info@helsingborgsvandrarhem.com
042-14 15 65 076-776 04 60

**Cityvandrarhemmet i Helsingborg,** Järnvägsgatan 39, havas 30 ĉambrojn, unu-litajn ĝis 6-litajn. Duŝejo kaj necesejo troviĝas en la koridoro.
www.cityvandrarhemmet.com
info@cityvandrarhemmet.com 042-14 58 50

**TRE GRAVE** estas mendi ĉambron kiel eble plej frue. En majo multaj homoj emas viziti Helsingborgon.